Universala Esperanto-Asocio

KAPABLIGO EN 2015

Estrara Subteamo: MOVADO

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

Estrara Komuniko EKO 2016-3 sendita el Budapeŝto la 5an de februaro 2016.

# EKO pri resumoj de agado sur kelkaj kampoj 2015

Ni kaptas la eblecon de niaj EKO-komunikoj por peri al vi pli frue ol kutime informojn pri kelkaj aspektoj de la agado en 2015. Tiuj alkroĉitaj dokumentoj estas nelongaj (1 aŭ 2-paĝaj PDF, abunde ilustritaj. Ili neniel pretendas esti oficialaj raportoj, ilia celo estas liveri al vi pli freŝajn kaj utilajn resumojn pri kelkaj facetoj de la bunta asocia vivo en la pasinta jaro, dum vi bone memoras ilin. Viaj komentoj kaj demandoj estas bonvenaj, bv. direkti ilin laŭeble rekte al la koncernaj instancoj.

La oficala jarraporto de la estraro aperos antaŭvideble en la junia numero de revuo *Esperanto* kaj estos prijuĝata de la komitato en Nitra.

Jen tre koncizaj resumoj pri la aldonitaj ilustritaj rdokumentoj; elŝutu kaj legu ilin laŭplaĉe.

## Tutmonda Esperantista Junulara Organizo - (ĉ. 500-vortoj)

La raporto elstarigas la gravajn atingojn de la junulara sekcio TEJO tra la jaro unuavice en la kampoj de eksteraj rilatoj kaj alpreno de pliaj oficistoj kaj volontuloj. La organizo elektis novan 5-kapan estraron, akceptis du novajn sekciojn (Kolombio kaj Benino) kaj trijaran laborplanon dum la 71a IJK en Wiesbaden, Germanio, kiu altiris pli ol 300 partoprenintojn. Pasporta Servo ricevis novan retejon.

Demandoj, komentoj: arina.osipova<ĉe>gmail.com (sekretario de TEJO)

## Afrika Agado

(ĉ. 790 vortoj)



La raporto resumas la atingojn de la jaro sub la kvar rubrikoj de UEA: Konsciigo (i.a. novaj retejoj), kapabligo (kursoj kaj AMO-seminario), Komunumo (kunsidoj kaj eldonado) kaj Kunordigo (reformo de la afrika komisiono kaj intensigo de komunikado). Foto: virina kunsido en 2015 en Kinŝaso, DR Kongo.

Demandoj, komentoj: adjevia<ĉe>gmail.com

## Edukado.net (ĉ. 460 vortoj)

La raporto temas pri ŝlosila partnero de UEA sur la instrua kampo.  El la 4138 membroj de la retpaĝaro 354 membriĝis en 2015.  Katalin Kováts, la redaktoro de la retejo, organizis KER-ekzamenojn tutmonde. La teamo sukcese finis trijaran Grundtvig-projekton, dumkongrese en Lillo okazigis lingvokursojn, ekzamenojn kaj aranĝis KER-ekspozicion. Kreiĝis la *uTalk*– kurso per modernaj teknikaĵoj, kie Esperanto lerneblas elire de 128 lingvoj. Por la Eŭropa Tago de Lingvoj, edukado.net sukcesis aperigi Esperanto-tekston en la portalo de la koncerna organo. En RISKO, la populara kleriga ludo, ĉiumonate ludas 140 personoj. Edukado.net daŭre ĝuas la subtenon de ESF por kurantaj kostoj, sed financas siajn projektojn el la membraj mondonacoj.

Demandoj, komentoj: katalin.kovats <ĉe>gmail.com

## Aktivula Maturigo  (ĉ. 260 vortoj)

La AMO-programo intensiĝis tra 2015, (v. reuon *Esperanto* de januaro 2016). Estis organizitaj naŭ seminarioj,en Brazilo, Svedio, Usono, DR Kongo, Germanio, Francio, Kubo kaj Hungario – 3 en Ameriko, 1 en Afriko, kaj 5 en Eŭropo. Kvin el ili okazis en novaj landoj. La sveda seminario estis la unua, kiu traktis ekskluzive informadon. Du traktis foto- kaj film-faradon . Ekde oktobro, la nova komisiito pri AMO, d-rino Sara Spanò kunlaboris kun la nuna administranto por povi transpreni la gvidadon ekde la mezo de marto 2016.

Demandoj, komentoj: stefan.macgill<ĉe>gmail.com




AMO 10 (Italio), 11 (Svedio), 12 (Usono), 13 (DR Kongo)






Vortoj: 460

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF postfarita per Nuance Power PDFapr 2016